

Marlo Morgan – Mesaĝo de antipodoj

En oktobro 2016 mi estis invitita al la kongreso de ĉeĥaj esperantistoj-fervojistoj en Prudká apud Tišnov. La programo estis interesa, ekzemple prelego de Martin Stuppig pri lia nova libro Home en senhomeco, vizito de ĝardena fervojo en Drásov kaj simile. Dum amuza vespero mi sidis ĉe tablo kun pluraj homoj, kiujn interesis literaturo. Ni rakontis unu al la alia pri niaj ŝatataj libroj kaj iu sinjorino rekomendis al ni libron de usona verkistino Marlo Morgan, naskiĝinta en 1937, kiu nomiĝas Mesaĝo de mutantoj, sed en la ĉeĥa ĝi aperis sub la nomo Mesaĝo de antipodoj (Poselství od protinožců). Daŭrigo nomiĝas Mesaĝo de eterneco.

Kiam mi revenis hejmen, mi vizitis Mahen-bibliotekon kaj la unuan libron mi tie trovis, pruntis kaj tralegis.

La aŭtorino rakontas, ke ŝi estis invitita kiel kuracistino al Aŭstralio por partopreni interesajn esplorojn. Foje ŝi ricevis informon, ke ŝi atendu antaŭ sia hotelo, ke alveturos por ŝi aŭtomobilo, kiu transportos ŝin al eksperimento, kiu estos por ŝi certe tre grava. Ŝi atendis kaj efektive alveturis aŭtomobilo stirata de aborigena ŝoforo, kiu sciigis al ŝi, ke li estis sendita por ŝi. Ŝi enaŭtiĝis kaj tre miris, ke la aŭtomobilo forveturis el la urbo. Post kelkhora veturo ili alveturis al grupo de aborigenoj, kiuj estis preskaŭ nudaj, nur kun tre modestaj strioj de ŝtofoj. Ŝia ŝoforo tuj senvestiĝis kaj ankaŭ li vestis sin primitive. Li sciis paroli angle, kaj li sciigis ŝin, ke por la eksperimento estas necese, ke ankaŭ ŝi senvestiĝu. Post certa hezitado ŝi obeis kaj kun teruro rigardis, kiel ŝiaj aĵoj malaperas en fajro, kiun ili bruligis. Forbrulis ne nur ŝiaj vestoj, sed ankaŭ mono, pasporto, poŝtelefono, simple ĉio. La tribo de proksimume 60 homoj aplaudis al ŝi kaj sciigis, ke ŝi kvazaŭ denove naskiĝis.

Ili komencis marŝi tra dezerta kaj duondezerta Aŭstralio. Ĉar ŝi ne havis plu ŝuojn, ŝiaj piedoj terure suferis, sed post kiam ili ŝmiris ŝiajn plandojn per speciala planta suko, la plandoj malmoliĝis kaj ĉesis dolori. Ŝi konatiĝis kun ĉiuj homoj en la grupo kaj konstatis, ke ĉiu havas iun specialan talenton, pro kiu li aŭ ŝi estas admirata kaj respektata de la ceteraj. Ili vivis en akordo kun la naturo. Ekzemple kaim alflugis nubo da muŝoj, ili ne svingis la manojn ĉirkaŭ si, kiel farus blankuloj, sed ili disbrakis kaj restis starantaj. La muŝoj purigis iliajn korpojn, eĉ nazon kaj orelojn kaj poste forflugis.

Ili ankaŭ regis telepation. Unu junulo iris rapide antaŭen por serĉi manĝaĵojn kaj post du tagoj la ĉefo anoncis, ke la junulo ĵus ĉasis kanguruon, forhakis grandan pecon da viando, ĉar la tuten beston li ne kapablis porti, kaj ke li revenas. Post unu tago li efektive aperis portante la viandon.

Ili interparolis kun la aŭtorino kaj diris al ŝi, ke nia raso jam tute perdis kontaktojn kun la naturo, ke ni opinias nin pli civilizitaj, sed en la realo tute male ni perdis civilizon. Ni anstataŭis la voĉo de la naturo per maŝinoj kaj nia ĉefa celo estas profito. Ŝi tre detale rakontas la marŝon kun tiuj homoj, interparolojn kun ili pri la mondo, universo, religio k.s.

Kiam ili transiris la tutan kontinenton kaj alvenis denove al modernaj urboj, konstruitaj ĉe la marbordo, la aborigenoj adiaŭis ŝin. Ŝi eniris en la urbon, aspektante kiel sovaĝulino, ĉar ŝi dum du monatoj ne tondis kaj ne lavis la korpon, nek la harojn. Ni ĉeĥoj povas diri, ke ŝi aspektis kiel Viktorka. Feliĉe kelkaj homoj, kiujn ŝi renkontis kaj klarigis al ili, kio okazis al ŝi, tiuj homoj ŝin helpis. Unue ebligis preni banon, aĉeti vestojn kaj telefoni al sia hotelo, kie ili dum la tuta tempo tenis ŝian havaĵon, ne sciante kion fari per ĝi.

Kiam ŝi revenis al Usono, ŝi decidis priskribi siajn travivaĵojn kaj eldoni la libron. Ĝi fariĝis furora libro, t.n. bestsellero, ĝi rapide disvastiĝis tra la tuta Usono kaj ankaŭ Eŭropo kaj estis tradukita al multaj lingvoj, do ankaŭ en la ĉeĥan. Montriĝis, ke la moderna homo estas jam iom laca de la tekniko kaj ke li ŝatas reveni almenaŭ en libroj al mondoj fabelaj. Dum en la 19-a jarcento ravis la mondon la teknikaj fabeloj de Jules Verne, nuntempe furoras libroj kiel Mastro de l' ringoj,

Narnie, Eragon, Harry Potter kaj similaj, en kiuj homoj ĉirkaŭitaj de teknikaj inventoj, revenas al fantazio. aŭ al la spirita universo.

Sed imagu mian surprizon, kiam mi volis iom pli ekscii pri la aŭtorino kaj mi trovis informojn pri ŝi en Vikipedio, kiuj ĵetis al la afero tute novan, pli precize malan lumon. Kiam la libron tralegis aŭstraliaj aborigenoj, ili ofendiĝis, deklaris, ke la aŭtorino mensogas kaj pri ilia kulturo scias nenion. Ili eĉ alveturis al Usono kaj post konfrontiĝo la aŭtorino konfesis, ke ŝi ĉion elpensis, ke temas pri fikcia romano.

Tamen mi ne bedaŭras la legadon, ĉar la libro instigas nin pensi pri nia civilizo. Ankaŭ aliaj libroj estas elpensitaj kaj se la libro impresas kiel realaĵo, tio eble ne estas manko.

Miroslav Malovec, 2017-01-25